

# Laŭokaza Novaĵletero

organo de la

**Internacia  
Komerca kaj  
Ekonomia  
Fakgrupo.**

Redakcia adreso :  
19 Cranbury Road,  
Eastleigh, Hants.,  
SO5 5HB,  
Britio.

VKEF  
★  
1984

Numero 22;

aŭgusto, 1988.

Laŭokaza Novaĵletero,

aŭgusto, 1988a.

## E n h a v o .

<u>paĝo</u>	<u>titolo(j)</u>	
2	Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo.	
3	Raporto pri kunveno	François-Xavier Gilbert.
4	Parolas la Redaktoro	Lorens' Mi.
5	Nia Jarkunveno en Roterdamo	Lorens' Mi.
6	Eurodicautom Novaĵeroj de k pri niaj membroj	Roland Rotsaert.
7	Esperanto-terminologio: kiel ... ?	Roland Rotsaert.
8	Al diskuto malfermita ...	Lorens' Mi.
9	- la sama - kompletigo	
10	Inter miaj pluraj profesioj ...	Lorens' Mi.
11	- la sama - kompletigo Novaĵeroj de k pri niaj membroj	
12	Reklamanoncetoj Teknike pri la LN-o.	

## Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo.

## La Estraros

S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ben. Sekretario  
 S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto  
 D-ro István Gether  
 S-ro François-Xavier Gilbert  
 S-ro Lawrence Mee  
 D-ro Marco Picasso  
 S-ro Seikō Yamasaki

Revizoro por la financa raportos:  
 D-ro Gianfranco Polerani

Centra sidejo (provizora):  
 Hornisgrindestrasse 8,  
 7580 Böhl 16, Dkc. Germanio.

Financa sidejo:  
 Visspaanstraat 97,  
 8000 Brugge, Belgio.

Redaktoro de la Laŭokaza Novaĵletero:

S-ro Lawrence Mee,  
 19 Cranbury Road,  
 Eastleigh, Hants., SO5 5HB, Britio.

-oOo-

## Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo.

Pagoj — Perantoj — Kotizo

Ciuj landoj: Baza kotizo: 400 belgaj frankoj aŭ 20 nederlandaj guldenoj.  
 Poŝtĉekkonto belga, (Bruselo): Konto ĉe Universala Esperanto-Asocio,  
 n-ro 000-1592629-83 Rotterdam, Nederlando,  
 je la nomo de IKEF, p.a. R. Rotsaert, je la nomo de Internacia Komerca kaj  
 Visspaanstraat 97, 8000 Brugge, Belgio. Ekonomia Fakgrupo, Belgio.

Perantoj:

Britio

- provizore vakas -

Jugoslavio  
 S-ro S. Taleski,  
 ul. 'Oslo' br. 12,  
 91000 Skopje.

Francio

S-ro F.-X. Gilbert,  
 Vert Coteau, Longeville-en-Barrois,  
 55000 Bar-le-Duc. (CCP1275-89 L Nancy)

Suda-Koreio  
 S-ro Han Moo-hyup,  
 CPO Kesto 5154,  
 Seoul.

Dkc. Germanio Kotizo: 20 markoj.

S-ro F.J. Braun,  
 Hornisgrindestrasse 8,  
 7580 Böhl 16.  
 (Volksbank Böhl 713104 - BLZ 66291400)

Novzelando Kotizo: 20 dolaroj.

S-ro J.C. Rapley,  
 P.O. Box 70-038,  
 Ranui, Auckland 8.

Hungario

S-ro J. Horvath,  
 Varsányi Irén u. 8,  
 1027 Budapest.

Togolando  
 S-ro Koffi Gbeglo,  
 B.P. 13169,  
 Nyékonakpoé, Lomé.

Italio

D-ro M. Picasso,  
 via De Gasperi 7,  
 20057 Vedano al Lambro.

## Raporto pri kunveno ĉe

la Internacia Komerco-Cambro en Parizo,  
 je mardo, la 14a de junio, 1988a.

## Ĉeestantoj:

por IKC: S-rino P. Reins, Direktoro de Publikaĵoj;  
 S-rino G. Pathiaux, Bibliotekisto.

por IKEF: S-ro F. Braun, Prezidanto;  
 S-ro R. Rotsaert, Financa Konsilanto;  
 S-ro F.-X. Gilbert, Estrarano.

## Kunvenloko:

La sidejo de *Chambre de Commerce Internationale*,  
 38 Cours Albert 1er, 75008 Paris.

## Celo:

Proponi aldonon de la internacia lingvo, Esperanto, en iu nova eldono de la komerca leksikono, *Key words*, eldonita de la Internacia Komerco-Cambro.

*Unua parto:* klarigo flanke de S-ro Gilbert pri la seriozeco de la internacia lingvo, (pasinteco kaj estonteco), kaj pri lingvistikaj esploroj de la eŭropa komunumo, ekz. pri la projekto de B.S.O. en Utrecht; multajn demandojn prezentas la du sinjorinoj, kiuj evidente bone preparis la rendevuon.

*Dua parto:* klarigo flanke de S-ro Rotsaert, agante kiel respondeculo pri traduklaboro ene de IKEF, pri nia traduklaboro, (metodo kaj fontoj). Li transdonas tri paĝojn de tiu traduklaboro, kaj tiu pruvo vekas grandan intereson flanke de la du sinjorinoj. S-rino Pathiaux kaj S-ro Rotsaert interŝanĝas siajn adresojn.

*Tria parto:* klarigo de S-ro Braun pri la nunaj uzadoj de Esperanto en la komerca kampo; li montras diversajn reklamanoncon en la revuo MONATO.

*Diskutado, (en agrabla etoso):*

S-rino Reins prezentas la lastan eldonon de *Key words*, kaj diras, ke ne plu estas loko por alia lingvo en ĝi. Si klarigas, ke en la venonta eldono la itala lingvo devos cedi lokon al la araba lingvo, kaj ke la IKC ekzamenas la eblecon eldoni komplementajn leksikonojn; en tiu kazo, povus leviĝi ebleco almeti la Esperanto-tradukon. Tiu ĉi lasta projekto celas uzi aliajn lingvojn, kiel la rusa, la ĉina kaj la japana lingvoj.

*Konkludo:* por helpi al S-rino Reins, kaj evidentigi la kapablojn de IKEF en tiu ĉi kampo, ni proponas tradukigi la paĝon 2, (esprimoj 177 ĝis 188), kvarlingve: angle, ruse, ĉine kaj japane.

La kunveno daŭris de 14.30h ĝis 16.30 h.

Tiun ĉi raporton kunmetis François-Xavier Gilbert.

## Parolas la Redaktoro.

Redakti envenintajn manuskriptojn por nia organo estas la plej facila parto de la taskaro esti Redaktoro. Malpli facila parto estas kunmeti la tuton por prezenti koheran kolekton de legindaĵoj. La plej malfacila tasko estas krei manuskriptojn kiam neniu ekzistas. Dum la du monatoj post la pasinta kajero de la LN-o, nur du membroj proponis manuskriptojn al mi; du aliaj membroj transdonis informerojn.

Tio certe ne sufiĉas, se nia celo estas eldoni legindan organon ses-foje en la jaro. Estu avertitaj, geamikaj membroj: se vi ne proponas manuskriptojn, vi ne havas elekton ol cedi al mi la rajton plenigi la paĝojn per propraj elpenzaĵoj, dum vi daŭre pagas, per viaj kotizoj, la kostojn de tio. La estonteco de la organo, (kiel ankaŭ de la Fakgrupo mem), restas en viaj manoj.

Al niaj lastatempe aliĝintaj membroj, mi etendas sinceran inviton, jam por la dua fojo aperigatan sur paĝo 12, surpaperigi pensojn kaj ilin proponi al mi. Se vi timas pri nekapableco en verkado, sed ja havas ion por diri, tamen faru la provon. Vi trovos, ke via Redaktoro ja pretas helpi en atingado de bona stilo, strebante samtempe konservi viajn vortojn kiel eble plej ofte. Kaj se temo interesas vin, plej eble ĝi havas intereson ankaŭ por aliaj membroj.

Malfiksu, do, la bremsojn,

kaj ek! al la laboro.

Pensoj pri neologismoj.

Kvankam nenia reago al miaj pensoj je paĝo 10 pasintfoje atingis min ĝis nun, mi mem vidis ion, kiu tuŝas rekte tiun temon.

Mi ricevis fotokopion de paĝo el la icocoa vortaro, paĝo por kiu IKEF proponis ekvivalentojn en nia lingvo. Konsternis min rimarki tie la proponon de "fri ĝis ..." por la angla esprimo, carriage paid to ...

Mi informpetis ĉe S-roj Braun

kaj Rotsaert, kiuj klarigis, ke la esprimo troviĝas jam en la IKEF de Munniksma. Mi kontrolis la aferon: ili pravas.

Krome, eĉ PIV proponas la neologismon, fri, kun difino: prepozicio signifanta: le ke la prezo inkluzivas la menciitan pagon; 2e ke la prezo inkluzivas la frajtopagon ĝis la menciita loko.

Sed la difino por prepozicio estas, (en PV kaj iom simile sed ne tiel bone en PIV): senfleksa vorto, kiu ligas substantivon aŭ infinitivon al alia substantivo aŭ infinitivo per difinita rilato de dependeco.

Neniel eblas, do, ke 'fri' estu prepozicio! Nek ke prepozicio tuŝgas en tiu ekzemplo.

Krome, la senco de carriage paid to ... estas klare donata per 'portado pagita ĝis ...' aŭ 'frajtkostoj pagitaj ĝis ...'.

Kaj jam en 1949 por la verko, Komercaj leteroj, la nederlandano C.A. Pruisen donas por Free on board, la esprimo 'enŝipigo pagita'. (Mi kontrolis la terminaron de Kreuz k Mazzolini, de 1927, (kiu, simile kiel 'Komercaj leteroj' troviĝas en la Biblioteko de IKEF), sed ne tie trovis taŭgan aludon.)

Kial alia nederlandano, S-ro Munniksma, elektis malobservi tiujn bonegajn proponojn, mi ne komprenas. Konstati ankaŭ, ke la anglo-parolanta kunlaboranto en IKEF, S-ro Venture, akceptis utiligon de tiu malinda neologismo, estas alia enigmo por mi.

Tiu ĉi okazaĵo eĉ pli forte emfazas la neceson funde kompreni la nocion malantaŭ iu nacilingva esprimo, antaŭ ol por ĝi kunmeti difinon kaj elpensi ekvivalenton en Esperanto.

Lastmomenta  
novaĵero.

La poŝtportisto portis al mi dum elpresado de la plej lastaj paĝoj de tiu ĉi kajero, leteron de nia Financa Konsilanto, letero en kiu staras informerojn por la rubriko, Interkonatigo! Ĝis la proksima ...

Nia Jarkunveno en Roterdamo,  
kadre de la Universala Kongreso, 1988.

Akurate je la 16a horo, dum lundo, la 25a de julio, 1988, S-ro Franz Braun, la Prezidanto de I.K.E.F., malfermis kun salutvortoj al la preskaŭ kvindek partoprenantoj, nian kvaran en sinsekvo Jarkunvenon. Je la podio sidis, kun la Prezidanto, S-roj Gilbert, Mee kaj Rotsaert, Estraranoj, kaj tre apude sidis D-ro Polerani, nia Revizoro.

Pardonpetoj pro ne-eblo partopreni estis transdonataj al la kunveno de Estraranoj Gether, Picasso kaj Yamasaki.

La Prezidanto prezentis la Fakgrupon al la ĉeestantaro, menciante la preparlaboron dum 1984, la fondkunvenon dum la U.K. en Augsburg, kaj la Jarkunvenojn en Pekino kaj Varsovio. S-ro Braun ankaŭ menciis la strebojn atingi ĝis iu grado la celojn de IKEF, kaj niajn subtenstrebojn por la Tria Mondo.

Inter pluraj rektaj aludoj al atingoj dum la pasinta jaro, S-ro Braun tiris atenton al la Simpozio en Budapeŝto, en kiu IKEF rekte kunlaboris, kaj al la daŭra interŝanĝado de ideoj pri fakaj terminoj en la koncernaj fakoj, komerco kaj ekonomio.

Plenaj detaloj pri la agado troviĝas en la Raporto por la jaro 1987, publikigita en Novaĵletero numero 20.

Tre lastatempe, tri membroj de la Estraro iris al Parizo por tie prezenti al la Internacia Komerco-Cambro niajn atingojn rilate al la vortaro eldonita de tiu organizaĵo, kaj niajn planojn por estonta kunlaboro.

Sekve de propono de S-ro Cwik, la kunveno akceptis tiun raporton kun amado.

La Financan Raporton por la jaro 1987 prezentis S-ro R. Rotsaert, la Financa Konsilanto por IKEF. Ankaŭ tiu raporto aperis jam en Novaĵletero 20. En tiu raporto, la elstara ero estas tiu de la modesta gajno spertita je la jarfino, kompare kun la malgajnoj de la pli fruaj jaroj, malgraŭ tio, ke je la jarfino kelkaj kotizoj restis ankoraŭ suldataj.

S-ro Rotsaert tiris atenton al la ekzisto de personaj kontoj por IKEF kaj ĉe UEA kaj ĉe la Flandra E.-Ligo. Lastatempe, tio estas, post la jarfino, tiu konto ĉe F.E.-L. estis konvertita al rentumdana ĉparkonto.

Prezentante provizoran bilancon je la fino de la unua duonjaro por 1988, S-ro

Rotsaert raportis modestan gajnon denove, ĉefe pro pli alta sumo pro kotizoj, sed emfazis la provizoran karakteron de tiu raporto, menciante sian timon, ke plej eble la kostoj por la Laŭokaza Novaĵletero estos konsiderinde pli altaj en la kuranta jaro.

Sekve de propono de S-ro Cwik, la Financa Raporto estis unuanime adoptita. La Prezidanto esprimis la dankojn de la tuta Fakgrupo por S-ro Rotsaert, pro evidente zorga mastrumado de niaj aferoj.

Dum diskuto kiu sekvis tion, S-ro Almasi transdonis plendojn de membrokandidatoj en socialismaj landoj, pro la troa alteco de la membro-kotizo; li petis konsideron de privilegia nivelo de la kotizo por tiaj personoj. La Prezidanto respondis, ke la temo estas konata kaj regule diskutata en la Estraro, ĝis nun sen eltrovo de taŭga solvo. Post atentigo de S-ro Texier pri alternativa sistemo, kaj de S-ro Welling pri la diferencoj en aĉetpovo en diversaj landoj, la Prezidanto promesis, ke la Estraro certe diskutos la aferon denove, kaj se eblos, proponos taŭgan aranĝon.

Kelkaj aliaj partoprenantoj aldonis siajn voĉojn al la diskuto, sed tamen finfine neniu interkonsento estis atingita. La temo restas problemo por la Estraro.

La Prezidanto enkondukis diskuton pri estontaj agadoj por la Fakgrupo, emfazante la ankoraŭ valoron de akiro de reklamancoj. Longa vico de partoprenantoj levis plurajn diskutindajn temojn: S-ro Heckhausen proponis kompilon de listo de varoj kun nomoj en la int. lingvo; S-ro Ruig atentigis pri la valoro de identecbildo en la LN-o; S-ro Andrić proponis la kunmeton de prestiĝa varbmateriale nova, kiun membroj povus montri al entreprenoj dum varbagado per, ekzemple, reklamancoj aŭ alia subteno; S-ro Ebenat proponis pripensadon de la ideo disdonaci reklamdonaĵojn; S-ro Cwik kaj D-ro Polerani parolis pri aktualaj spertoj en la kadro de la Eŭropa Komunumo, kaj aliaj membroj faris aliajn proponojn. La diskuto restis tre vigla dum plena horo.

S-ro Gilbert gvidis voĉdonadon por elekto de du Estraranoj. Per aklamado, la kunveno re-elektis la demisiintojn, S-ro Braun kaj D-ro Picasso. 1m

Jam establita sistemo,  
en la kampo de tradukado en Ebrojo :

### EURODICAUTOM.

La terminarego de la Ebroja Komisiono, la tiel nomata EURODICAUTOM, (pr.: ebrodikautom), celas helpi la tradukistojn kaj aliajn funkciulojn de la diversaj ebrojaj instancoj, kiam tiuj funkciuloj serĉas por terminaj ekvivalentoj en iu el la naŭ oficialaj kaj porlaboraj lingvoj de la Ebroja Komunumo. Kiel konate, tiuj estas la hispana, la dana, la germana, la greka, la angla, la franca, la itala, la nederlanda kaj la portugala lingvoj.

EURODICAUTOM estas elektronika sistemo, kiu administras multlingvan terminaron; tiu konservas en sia aŭtomatigita sliparo, 450 000-slipan aron de leksikonoj, kun sume pli ol du milionoj da terminoj fakaj. La sistemo ebligas kaj rektan konsultadon, (kvazaŭ dialoge, per ekrano), kaj kvantan prilaboradon.

Paralele kun tiu terminarego ekzistas ankaŭ sliparo kun 110 000 mallongigoj kaj sigloj.

La terminologia laboro pritraktata estas tiu de la diversaj aktivecoj de la Komisiono, kun elekster-alvenintaj aldonoj, en kadro de kunlaborprojektoj.

Prezentado de la informoj eblas aŭ en formo frazeologia, (ekz.: la terminologio de traktatoj), aŭ en la pli kutima formo de teknika termino, memstara vorto aŭ vortgrupo. En la plej multaj kazoj, aldoniĝas klarigo per difino, per kunteksto aŭ noto, kun ekvivalentoj en la diversaj lingvoj. Aldoniĝas indikoj pri fonto kaj pri fakoj de uzado.

La EURODICAUTOM-sistemo estas simpla kaj efika ilo por uzado, ellaborita de la instancoj de la Komisiono. Speciala komparlogiko en la sistemo ebligas prezentadon de respondo, al iu aparta peto, en vicordo de eble malkreskanta taĝeco, tiel ke la plej fidinda informo venas unue al atento, sed sen neglekto de aliaj, ne-kompletaj informoj.

Membroj de la publiko rajtas informpeti ĉe la sistemo, per uzado de la tiel-nomata telematika reto, ECHO. (Pri desegnaĵdetaloj rilate al ECHO, ni ankoraŭ atendas klarigon.)

Tradukita el oficiala informfolio en la franca lingvo, de Roland Rotsaert.

Novaĵeroj de kaj pri  
niaj membroj.

S-ro Hans Wiersch, (IKEF 19), komecis jam kunmeti vortaregon de vortoj, esprime kaj parolturnoj el la germana lingvo en Esperanton, esperante iam eldoni ĝin por esti konsultlibro.

Nia membro, sur kies identecŝildo jam aperas aludo al tiu flankokupo, invitas proponojn de kunlaboro en tiu projekto, kaj same interŝanĝadon de ideoj kun aliaj personoj, el aliaj etnaj lingvo-grupoj, kiuj havas similan intereson.

La adreso por korespondado estas :  
Tilsiter Strasse 21,  
7063 Welzheim, Okc. Germanio.

S-ro Roland Rotsaert, (IKEF 3), (nia Financa Konsilanto), anoncas, ke ekde la 1a de aŭgusto li laboras en la fakoj ekonomio kaj statistiko en la Universitato de Antverpeno, (Rijksuniversitair Centrum Antwerpen, RUCA).

Ni esprimas al S-ro Rotsaert niajn esperojn, ke la nova labortereno donos al li kontenton dum laborado kaj ĝojon pro novaj kontaktoj sociaj. Ni ricevis promeson, ke adaptita identecŝildo aperos en venonta Novaĵletero.

De S-ro Rotsaert ni ricevis informojn pri EURODICAUTOM, (vidu la apudan artikolon), pro tio, ke la koncerna instanco de la Ebroja Komunumo petis lastatempe proponojn por kunlaborado en la evoluigo de tiu vortarego. Unuavide, diras nia membro, tiu peto ŝajnis esti interesa al ni en IKEF, kaj li esploris la projekton por ni.

S-ro Rotsaert nun verdiktas, ke IKEF disponas nek pri la homaj nek pri la teknikaj rimedoj por povi kunlabori laŭ la bezonoj de la projekto. El la disdonitaj informoj evidentiĝas, ke la projekto estas tute aŭtomatigita tiel, ke kunlaboranto nepre devas disponi pri speciala aparataro. Aparte de tio, la instanco vere serĉas kunlaborantojn kapablajn regi plurajn fakojn de esploro.

Al via Redaktoro ne-eviteble venis la penso, ĉu iel IKEF povos iam utile kontribui ion en la kampo de terminiko, konkurence kun tiu enorma vortarego jam utiligebla en naŭ lingvoj? Sed tuj venis alia penso, ke Ebrojo ne estas la tuta mondo por ni; nia tereno restas ne-tuŝita, mi pensas, sed ni ja nun konas resp.ektindan rivalon.

Ni esprimas alian Dankon! al S-ro Rotsaert pro lia entreprenemo.

Esperanto-terminologio: kiel ... ?

scivolas Roland Rotsaert.

Antaŭ unu jaro mi estis sufiĉe optimisma pri tiu ĉi afero, jam de la fondo de nia Fakgrupo sur nia agadplano. Mi ĵus finfaris -- en relative mallonga tempo -- malneton de Esperanto-versio de la plurlingva *Key words* de la Internacia Komercio-Cambro; mi aldis kelkajn novaĵerojn, (pri ISO-klavaro kaj pri teleteksa signaro), evolupaŝoj kiuj baldaŭ forigos la ekzistantajn problemojn ligitajn kun Esperanto-skribado; mi legis en (serioza) gazetartikolo, ke en Orienta Germanio baldaŭ amase ekproduktiĝos IBM-kongruajn komputorojn; UEA fondis terminologian centron; PeKoTeKo de Akademiano Eichholz ŝajne bone funkcias.

Nunatempe mi estas malpli optimisma. Mi konstatas, ke perkorespnda reviziado de terminaro ne eblas; ke mia komputoro ne estas IBM-kongrua: kunlaboro kun PeKoTeKo ne eblas por mi. Evidentiĝas, ke en la originala *Key words* ekzistas multaj eraroj. Pri la ISO-klavaro mi nenion plu aŭdas; pri Teletekso mi aldis, ke ĝi estas apenaŭ ligebla kun aliaj komputoroj, (sed "oni verkas programon tiucelan"). Ankaŭ pri la aparataroj el Dr. Germanio mi nenion plu aŭdas. Laborplano de la Terminologia Centro mi ankoraŭ ne vidas. PeKoTeKo certe havas la grandan avantaĝon, ke ĝi ekzistas kaj funkcias, sed tamen mi dubas, ĉu nespertaj kunlaborantoj facile povos uzi la necesan programaron. Laste en tiu listeto: pro profesiaj kialoj mi ne plu povas dediĉi tempon okupiĝi pri terminologia laboro.

Necesas analizi la kialojn de mia iama optimismo. Mi spertis, ke komenci terminologian laboron ne estas malfacila afero. Orientgermanaj komputoroj ŝajne donus eblecon al orientebrojaj landanoj efike kunlabori: ĉar multaj alfabetoj de tiu regiono postulas uzadon de apartaj literoj, la fabrikantoj en Dr. Germanio certe aplikus la tiurilatan ISO-normon. UEA-TeC povus kunordigi la laboron, kaj verki speciale adaptitan, facile aplikeblan programaron, kiun PeKoTeKo povus transpreni. Resume: anstataŭ estante evolulando, Esperantujo iĝus lando kun modernaj komunikiloj kaj avangardaj produktoj-varoj.

Jen pensaro por pridiskuti, kaj, (ĉar mi ne konas iun alian!), mi kunmetas propran proponon de laborplano.

Estas evidente, ke ni utiligu (personajn) komputorojn. TeC konsilu al ni kiun sistemon, kiun diskoformaton, kiun programon, kiun ekransformaton, kaj tiel plu, ni adoptu. Necesas, ke almenaŭ inter la komputoroj de Esperantujo ne estu komunikadproblemoj. Fabrikistoj de tiaj aparataroj eksci, ke en Esp.-ujo estas tuj disponebla merkato de miloj aŭ, verŝajne, dekmiloj da aparataroj.

Mi nur iom konas la PeKoTeKo-programon de Ak-ano Eichholz. Mi proponas, ke ni ne utiligu simple ekzistantan, komerce-por-ĝenerala-utiligo-en-la-angla-lingvo-programon, ĉar tiaj program(ar)oj estas nefacile uzeblaj por celoj aliaj ol tiuj antaŭviditaj, kaj ofte enhavas por-ni-ne-uzebajn trajtojn: ni bezonas speciale verkitan programaron. Eldonejoj de vortaroj jam havas tiajn programojn: eble en tio kuŝas solvo por ni. Eventuale, ni povus ankaŭ transpreni de tia eldonejo la bazan vortstokon kun difinoj, kontraŭ transdono de prefera rajto eldoni la TeC-produktojn.

Posta fazo estu la registrado, uzante la de-TeC-proponitaj iloj, de la plej bonaj E.-vortaroj, fakaj kaj ĝeneralaj. Plej urĝa tasko, mi sentas, estas tio de elektronika registrado de Plena Ilustrita Vortaro, (PIV); tiu laboro ĉiaokaze estos iam farenda, se oni iam decidis eldoni ion alian ol fotorepreson de la nuna eldono. Elektronika PIV povas esti bazo de multaj aliaj verkoj. Tre lastatempe mi legis raporton, ke en Irano oni kompilas vortaron surbaze de PIV. Tiu laboro verŝajne okazas 'per-mane'; kia malŝparo de homfortoj!

Samtempe kun la ĵus-proponita fazo, ĉiu fakgrupo relegu la fakajn tekstojn aperintajn dum la lastaj 10 ĝis 20 jaroj, kaj registru la tiean uzon de terminoj en la intertempe-elektronike-registratan fakan vortaron. Tiu laboro povas okazi en pluraj landoj samtempe, per pluraj personoj kaj en pluraj lingvoj. La programo devas permesi aŭtomatan kunigon.

Se noveldono de iu terminaro estas necesa, tiam grupo de fakuloj kunvenu por verdikti pri adopto de apartaj terminoj. Ĉar terminaro kutime enhavas nur mil ĝis du mil erojn, tio estas farebla dum maksimume unu semajno.

n.d.l.R: Iom redaktita teksto el la originalo.

## Laŭokaza Novaĵletero

Al diskuto malfermita, volas tuj ion kontribui la Redaktoro.

Ŝajnas, ke la temo de terminologia laboro estas temo kiun teoriistoj dum la tuta historio de nia lingvo seninterrompe diskutadis; ŝajnas, ke la diskuto daŭros simile dum la estonta historio.

S-ro Rotsaert donas emfazon al pluraj vere diskutindaj punktoj, (en la artikolo trovebla je paĝo 7 de tiu ĉi kajero). Ke li ne restas optimisma pri la estonteco de tia laboro ene de la Fakgrupo, estas afero de bedaŭro, ŝajnas al mi, sed tamen ni tre danku lin pro tio, ke li dediĉis la tempon atentigi nin pri ŝanĝoj en la situacio, kiel ĝi rilatas al grava ero de nia agadplano.

Eble helpas en nia diskutado, se mi tiru atenton al evolupaŝo ne menciita de S-ro Rotsaert. En la antaŭnelonge-eldonita kajero por 1987 de Akademias Studoj, Ak-ano Eichholz aperigas longan eseon propran kun la titolo, Terminiko en la inter-etna lingvo. Krom doni tute klaran rezonadon pliedante por la uzado de la termino, inter-etna, anstataŭ 'internacia' por priskribi nian lingvon, Ak. Eichholz proponas difinojn por pluraj terminoj.

Pri 'terminologio', la aŭtoro asertas, ke ĝi estas la scienco kiu okupiĝas teorie pri formado kaj nomado de nocioj. (Utilus jam nun kontroli la difinon de 'nocio', je PV paĝo 330.) Por la aplikata scienco aŭ arto de praktika terminokreado, prefere ni pensu pri 'terminiko', kaj do pri terminika laboro, proponas nia eminenta kolego en tiu ĉi kampo.

Krome, pri nocioj Ak. Eichholz konsilas, ke la plej grava postulo por kreado de nova termino estas klara interrespondo inter la difino de la nocio kaj la elektota termino. Tiu interrespondo povas facile okazi en la internacia, (aŭ inter-etna), lingvo, sed ne tiel facile en la naciaj aŭ pure etnaj lingvoj.

Kaj plue, kolego Eichholz emfazas, ke iu ajn terminologia laboro komenciĝas per nocioj. Ĉi klopodas strikte difini nociojn. La sfero de nocioj estas sendepende de la sfero de terminoj. La nocio estas la senco de termino, kaj terminoj devas esti tiel klare difinitaj, ke ili estu kompreneblaj sen kuntekto.

Kun ĉiuj el tiuj asertoj, mi mem plene konsentas. El tiu mia konvinko, kiu efektive ne estas nova konvinko sed sinteno kiun mi portadas jam dum jaroj, venis mia alvoko, je paĝo 10 de LN-21, por proponoj de novaj terminoj senescepte kun difinoj. De precize la sama konvinko

venas mia konsilo al lernantoj de nia lingvo, konstante kontroli difinojn en Plena Vortaro, por kapti la esencan signifon de la ĉiutagaj vortoj de nia lingvo. De la sama konvinko venas mia aserto, (plurfoje elparoligita dum prelegoj pri tiu ĉi temo), ke la ĉefa vortaro de nia lingvo devas esti ĝisdatigita eldono de Plena Vortaro, komuna vortaro por la tuta mondo, por la ĉiutagaj vortoj de nia lingvo; ĉiu alia vortaro, mi asertas, devas esti plurlingva, simile en koncepto de tiu baza vortaro en nia kampo de laboro, la I.K.-E.V. de Munniksma.

S-ro Rotsaert asertas, ke perkoresponda reviziado de terminaro ne eblas. Mi plene kontraŭstaras tiun aserton. Pruvo ke mi pravus en tio estas facile konstatabla en la majstra verko de Eichholz, (ne plu disponebla al ni, bedaŭrinde), tiu de la Slipara Vortaro. La listo de nomoj de kunlaborantoj dum kunmeto de tiu SV enhavas pli ol okdek nomoj en preskaŭ dudek landoj. Bezonata estas klara priskribo de la laborometodo sekvenda; plene evidente iu tia laborometodo baziĝas sur interŝanĝado de slipoj en iu formo, kun konstato, ke la ĉefa laboro estas atingi interkonsenton pri la difinoj.

Utiligo de komputoro flanke de kolego Eichholz estas nenio pli ol preni logikan antaŭpaŝon, ekspluatante por ni la eblecojn proponatajn de tiuj ekipaĵoj de la lasta kvarono de la dudeka jarcento. Mi mem tre bedaŭras la forpason de la SV, sed mi senhezite subtenas la utiligadon de la nova tekniko. PeKoTeKo estas provo konservi la plej bonajn ecojn de la SV, kun samtempa adopto de pli facila metodo interŝanĝi 'slipojn' kun ŝparo de postkostoj, kaj tiel plu, per interŝanĝo de memordiskoj kapablaj konservi grandegajn kvanton de difinoj.

La elpresita formo de PeKoTeKo tute ne plaĉas al mi, kiel mi jam plurfoje deklaris al kolego Eichholz. La adopto de la marko IBM por la komputoro, flanke de Eichholz, ne plaĉas al mi pro tio, ke nenio alia kompanio en la mondo faras pli ol faras IBM en la detruo de lingvoj aliaj ol la usona dialekto de la angla lingvo; tute certe IBM mem ne havas eĉ la plej malgrandan intereson en la ideo proponi por vendi komputorojn taŭgajn por uzado kun nia inter-etna lingvo. Se iu leganto volas ekscii kio estus bezonata adapti komputoron por Esperanto, mi konsilas, ke tiu leganto trovu mian eseon de 1983 en revuo MONATO.

Al diskuto malfermita ... daŭrigo el paĝo 8.

Perkomputora traktado de terminika laboro estas ne pli malfacile, baze, ol registrado de katalogo de gramofonodiskoj aŭ libroj. Multaj komerce haveblaj programaroj bele taŭgas por la tasko, kondiĉe, ke la grandeco de la efemera memoro kaj prizorgadkapablecoj de la komputoro mem taŭgas. La elekto de IBM-kongrua aparataro estas plene defendebla laŭ tiuj du postuloj. Por tiaj taskoj, diversaj programaroj estas proponataj, kaj la fakto ke la IBM-kongrua komputoro estas speco kun jam granda debito certigas, ke la kosto de tiaj programaroj daŭre falas, kaj pro la rivalecoj inter programentreprenejoj kaj pro ŝparoj eblaj pro la grandkvanteco de la merkato.

La malfacilaĵoj eniras la scenejon kiam ni volas utiligi la apartajn literojn de la Esperanta alfabeto. Legantoj facile konstata, ke miaj streboj devigi mian modestan aparataron agnoski tiujn literojn ankoraŭ ne atingis sukceson.

\*Kaj miaj bezonoj estas vere modestaj: mi volas konservi kaj elpresi la literojn. Por terminika laboro necesas, ke la komputoro faru pli ol tio; ĝi devas ebligi ordigadon de vortoj enhavantaj tiujn apartajn literojn. En tiu lasta postulo kuŝas la vera malfacilaĵo. Kolego Eichholz trovis solvon por eĉ tiu malfacilaĵo. (Legantoj volantaj ekscii la metodon trovus plenajn klarigojn en la kajeroj de Akademias Studoj.)

S-ro Rotsaert eraras, miaopinie, pensante, ke adopto de la tiel-nomata ISO-normoj pri literoj aŭ pri klavaro estus iu solvo de nia problemo. La normoj de la ISO neniel tuŝas nian lingvon, nek la francan, germanan, polan aŭ ktp-an lingvon, kiam temas pri ordigado de vortoj en kiuj apartaj literoj aperas. La mondo de la komputoro estas la usonangla mondo, tutsimple. Ke la mamuto IBM konsentas ebligi limigitan traktadon de apartaj signoj, inkluzive de literoj de aliaj lingvoj, neniel ŝanĝas tiun sintenon.

Legantoj de revuo MONATO verŝajne memoras, ke siatempe mi proponis desegnadon kaj produktadon de Esperanto-komputoro. La bazon de la desegno mi publikigis, kaj mi petis subtenadon, pensante ĉefe pri proponoj investi monon en la entreprenon. La propono mortis post nur kvin monatoj, kaj pro tio, ke la subtenado kiu ja venis estis tro modesta, kaj pro tio, ke pluraj konataj Esperantistoj esprimis sian malan sintenon rilate al la ideo. La jaro estis 1984; verŝajne simila ŝanco neniam

revenos. Ni ne havas elekton, ŝajnas al mi, ol subteni la elekton faritan de kolego Eichholz pri la marko de komputoro kaj pri programaro; kiel asertas S-ro Rotsaert, PeKoTeKo ekzistas kaj funkcias.

Mia sinteno estas, ke kolego Eichholz faris malbonan elekton en la aspekto de la elpresitaĵoj el PeKoTeKo. Bezonata nun estas premo sur li adopti pli 'vendeblian' aspekton, pensi pli pri la fina presita formo de faka vortaro ol pri la eblecoj 'konversacii' pere de memordiskoj pri eblaj formoj de terminoj. Samtempe, kolego Eichholz devas ĉesi devigi kunlaborantojn sklave subteni lin en deviaj paŝoj rilate al la lingvo mem, devioj kiuj ne rilatas al terminika laboro. Mi pensas ĉefe pri du trajtoj: la adopto de majusklo por derivaĵoj el propraj nomoj, kaj la subteno de devia propono por landnomoj. Se ni povus persvadi nian kolegon ŝanĝi sian sintenon en tiuj tri rilatoj, mi mem pretus, malgraŭ mia malŝato, aĉeti komputoron kaj programaron laŭ liaj konsiloj, kaj aliĝi al la laboro. En tia kazo, kompreneble, mi pretus provi persvadi aliajn kolegojn aliĝi al la teamo kun mi.

S-ro Rotsaert mencias la mankon de novaĵeroj pri laborplano de la Terminologia Centro de UEA, (TeC). Tia manko neniel mirigas min, mi ne hontas konfesi. Jam antaŭ la fondiĝo de tiu Centro, mi korespondis perletere kun la persono kiu nun estas la Direktoro de la Centro. Pro tiu interŝanĝo de leteroj, mi malvolonte sed rapide venis al konkludo, ke antaŭvidi valoran laboron el tiu Centro estus nenio pli ol revo ne atingebla. Aparte de iu alia konsidero, tiu Centro ekde antaŭ la fondiĝo, adoptis sintenon kontraŭ subteno de la Akademio de Esperanto. Mi nete rifuzis pli rilate kun Centro kiu povus tiel malsaĝe agi.

Bezonata estas klara laborplano. Tiel tre trafe konsilas S-ro Rotsaert. Ke li ne egale klare esprimis subtenon por tiu baza laborplano, kiun mi proponis jam en LN-21, mi ne komprenas. Nia Fakgrupo havas respondeculon pri terminika laboro; klare, tamen, grave mankas al ni sinproponoj por kunlaboro. Kaj baze al iu ajn propono por tia laboro devas esti sufiĉe fidinda financa bazo. Ni estu realismaj pri tio: tre verŝajne tia financa bazo por ŝiam mankos al ni.

Lorens Mi.

## Inter miaj pluraj profesioj, la plej bona ...

En mia junaĝo, se mia memoro ne erariĝas min, la plej ofta sinteno estis, ke homo elektas profesion, ĝin eniras post trejnado, kaj en ĝi restas dum la ceteraj jaroj de sia vivo. Ne tiuj planoj efektiviĝis, kompreneble. Tre ŝatata profesio tiutempe estis tio de lokomotivestro sed ne tiuj aspirantoj kiuj eniris en la stabanaron de la fervojaj kompanioj atingis tiun kulminan funkcion. Kaj simile pri tiuj knabinoj, kiuj aspiris esti estrino de prestiĝa malsanulejo, aŭ pri tiuj knaboj kiuj zorge sinekzercis cele al profesia ludado kun piedpilko. Sed se oni traŝiris trejnadperiodon en medicino, ekzemple, plej eble oni baldaŭ diplomitiĝis kiel kuracisto kaj tiel restis.

Ambicio mia tiam estis esti - iam - la posedanto de butikoj, kvankam ĉu mi volis vendi nutraĵojn, vestaĵojn, meblojn aŭ tagĵurnalojn, mi ne povas nun memori.

Certe estas, ke ekde la juna aĝo de eble dek tri jaroj, mi konis la mondon de negocoj, de podetala komerco.

La plej frua provo okazis en la kampo de tagĵurnaloj, efektive. Tiutempe, en la mezaj tridekaj jaroj do, mi vizitadis teknikajn lernejojn en Manĉestro, kaj por helpi al mia patrino doni al mi semajnmanĝaĵojn, mi laboris matene kaj vespere liverante ĵurnalojn, dungite tiucele de loka butikoj de tiu speco. Mia hejmo situis sufiĉe apude al la stadiono de la renoma teamo en la mondo de futbalo, "Manchester City"; ĉiusabate, en la posttagmezo, multaj homoj iris spekti maĉon en tiu stadiono, okazaĵo kiun mi bone konis. Sekve de propono de la butikestro mi foje iris ĝustatempe por la finigo de la maĉo, kaj ekster la stadiono mi proponis por vendi, kaj efektive vendis, ekzemplerojn de la loka vesperĵurnalo.

Prave mi priskribis, ke tio okazis sekve de propono de la butikestro. Li ĉiaokaze vendis tiujn vesperĵurnalojn trans la vendotablo, kaj volis plivastigi la debiton. Li pretis vendi al mi, laŭ la normoj de pogranda komerco en tiu sektoro, la ĵurnalojn laŭ dekduoj, por ke mi vendu ilin unuope kaj spertu gajnon.

La vendoprezo de la vesperĵurnalo estis unu penco; la kosto al mi por dekduo da ili estis ok pencoj. Sed en tiu sektoro de komerco, dekduo estis ĉiam dek tri ekzempleroj, kaj je sukcesa vendo de tiuj ekzempleroj, mia gajno estis po kvin

pencoj. Bona komerco, ĉu ne?

Sed ĉar mi devis fari firmajn mendojn ĉe la butikestro antaŭ la vera tago, foje okazis, en tagoj de pluva vetero, kiam la ĉeestantaro ĉe la stadiono estis malpli ol kutime, ke mi devis porti hejmen tute senvalorajn foliojn. Oni devas frue lerni la lecionojn de bona komerco!

Fininte mian periodon ĉe la teknika lernejo, mi eniris kompanion kiu promesis instrui al mi valoran metion, tiu de prizorgado kaj riparado de oficejaj ekipaĵoj; mia taskaro en la fruaj monatoj, tamen, estis simple tiu de juna knabo kiu plenumas ĉies ordonon.

Sed ja mi multon lernis, ĉefe pri bona organizado de taskoj en oficejo neĝranda, pri taĝgaj manieroj verki leterojn kaj mendojn, pri bona sinteno fronte al kliento, kaj tiel plu.

Kaj ne eblis ne lerni multon pri la oficejaj ekipaĵoj, kiuj estis la varoj de la kompanio. La promeson vere instrui al mi la metion plenumis la kompanio, kiam nova knabo siavice transprenis mian taskaron.

Pro tiu trejnado, mi havis metion kiu bone servis al mi dum multaj jaroj. Et dum mia periodo de militservado, mi povis pli-malpli sekvi la saman metion, kaj mia kono de oficejaj ekipaĵoj daŭre plivastigiĝis. Iam poste, mi promociiĝis en la kompanio, kaj iris al Hinda Unio, por tie estri la inĝenieran fakon en la norda parto de tiu vasta lando; mi estris oficejon kun stabanaro de metiistoj.

Sed fone al mia taskaro tie estis klara kompreno, ke grava rolo por mi estas tio de instruanto. Ekde tiam, instruado ĉiam ludis rolon en mia profesia vivo. En tiu aparta posteno, mi restis iom pli ol tri jaroj, eksciante multon pri ege interesa lando kaj homaro.

Reveninte al Britio, nun kun iom da renomo kiel kaj direktisto kaj kiel specialisto pri la (nun multe pli komplikaj) kalkuladmaŝinoj de la kompanio, mi prenis la postenon estri la inĝenieran fakon de la filio en Norda Irlando. Dum miaj jaroj tie, (efektive en 1958), la unua speco de komputoro eniris mian prizorgkampon. Mia profesia vivo vere ŝanĝiĝis nun! Kaj denove mi multon lernis.

Ne tre longe poste, mi forlasis la inĝenieran fakon kaj dum nova periodo de

Inter miaj ... profesioj ... - daŭrigo

jaroj estris la komputoran fakon, ĉi-foje en Skotlando.

La komputoroj mem evoluadis; la plenumblaj taskoj daŭre kaj rapide plivastigiĝis, kaj la gamo de miaj zorgoj egale rapide plivastigiĝis ankaŭ. Mia pangajna vivo tiam estis la plej bona kiun mi ĝis tiam spertis.

Kaj ĉiuj miaj ĝis-tiam-akirintaj lertecoj kontribuis al la kontentiĝo, kiun mi spertis poste, en ankoraŭ diversaj postenoj. Frue en la sepdekaj jaroj, plene de memfido pri mia vasta gamo de kono pri oficejaj problemoj, solvoj kaj sistemoj, mi starigis mian propran entreprenon, kun unu-persona stabanaro: mi mem, kaj invitis negocojn. Proponoj ja venis al mi, kaj mi ja enspezis honorariojn pro servoj faritaj, sed ŝajne io mankis en la recepto, ĉar la sumo de la enspezoj restis tro modesta por miaj elspezoj.

Venis propono, ke mi eklaboru por la Esperanto-Movado, en Roterdamo. Ne bezonis longan tempon diskuti la proponon: mi iris al la Centra Oficejo frue en bela printempo de la jaro 1973, kaj tie kun fiero transprenis la taskaron de kontentado. Ke post malpli ol kvar jaroj mi denove eniris novan profesion neniel deprenas el mia sento de granda kontento, ke mi ja havis tiun ŝancon labori por idearo kiu estis tiam, kaj restas ankoraŭ, tre kara, en la plej bona senco, por mi. Sed ofte pro iu sperto, alia sinprezentas.

Kaj miaj postaj spertoj ja estis intime ligitaj kun la internacia lingvo, kaj ankaŭ kun instruado, tiu flanko rolo kiun mi kovis jam de pluraj jaroj. Profesie, mi eniris la kampon de lingvo-instruanto.

Flankokupe, mi starigis eldonejon, kun la subteno de mia (ankaŭ Esperanto-fanatikulo) edzino, kaj volis, ke tiu aparta entrepreno ja tiel floru, ke nur ĝi provizu la bezonatajn vivrimedojn por deca vivtenado. La sorto decidis alie. Eble iam mi rakontu plene pri tiuj jaroj, sed emfazendas, ke eĉ ne tre kontentigaj spertoj ja ebligis enorman ĝuadon de vivo plene de memorindaj okazaĵoj.

Lastatempe, mia profesio ŝanĝiĝis denove. Mi emeritiĝis.

La sperto estas ankoraŭ tro nova por ebligi kvalitujuĝon valoran, sed jam evidente estas tio ĉi, ke el miaj pluraj profesioj, ĝi estas la plej bona.

Senhezite, mi ĝin rekomendas!

Lorens' Mi.

Novaĵeroj de kaj pri

nijaj membroj.

De S-ro Rainer Heckhausen ni ricevis dum vizito al la Universala Kongreso en Roterdamo kopion de eseo propre verkita.

La temo estas la propono de Ak-ano R. Eichholz enkomputorigi vastan glosaron de fakaj vortoj, utiligante la programaron TERMEKS, kaj poste ĝenerale vendi memor-diskojn mem utiligeblajn dum tradukadlaboro. Pri tiu propono ni jam dediĉis malavaran spacon en la LN-o, kaj oni rajtas esti scivolemaj pri kial ni denove mencias la projekton.

Tiu ĉi eseo de S-ro Heckhausen havas la apartan meriton trakti pri la projekto kial pri projekto efektive realigebla; la multaj detaloj estas kolektitaj sub taŭgaj kapvortoj, kaj la ĉefaj emfazoj estas pri farendaj taskoj cele al realigo de la projekto. Diskuto pri kostoj kaj juraj demandoj okupas konsiderindan spacon, kaj la temo de laborprincipoj ankaŭ ricevas meritatan traktadon.

Iom surpriza afero dum legado estis noti la plurajn aludojn al kunlaboro kun nia Fakgrupo en la sekcioj pri kostoj kaj pri aliaj organizaj demandoj. Evidente, nia Fakgrupo ja komencas akiri iun reputacion! Ke principe ni volonte pretas kunlabori en tiu ĉi grava projekto estas kvazaŭ memevidenta afero, sed ĉu en nia nuna stato ni povos efektive plenumi tian rolon povas esti alia afero. Jen alia kaŭzo peti atenton al nia sistemo aperigi identecŝildojn de niaj membroj; eble ja taŭgus pensi nun pri eldonado de tiuj identecŝildoj en la formo de broŝuro, kiel proponis al la Estraro la prizorganto de la reto, S-ro F.-X. Gilbert.

Kopioj de la eseo estas verŝajne riceveblaj de la aŭtoro, (sed estus ĝentile kunsendu kun la peto irpk-n'), ĉe la adreso:

S-ro R. Heckhausen,  
Waldenburger Strasse 3,  
7149 Freiberg N.,  
Okc. Germanio.

----- oOo -----

RICEVITAJ ĉe la Redaktoro :

Revuo FOKUSO, numeroj 88-1 kaj 88-2.

Recenzo aperos en la posta kajero de la Laŭokaza Novaĵletero.

----- oOo -----

## R E K L A M A N O N C O J

## R E K L A M A N O N C O J

## R E K L A M A N O N C O J

Reklamtarifoj:

a) por Membroj de IKEF:

unu anonceto ĝis inkluzive  
s e s linioj: senpage;por pli longaj anoncetoj:  
po 1 respondkupono, (irpk),  
por ĉiuj komenciĝantaj ses  
linioj de 27 literospacoj.  
Ĉiam: unuope mendendaj.

b) por ne-Membroj de IKEF:

po 1 irpk por ĉiu linio, aŭ  
por ĉiuj tri milimetroj de  
longeco, enkadrigita,  
sed kun minimumo de ok  
irpk-oj. Ĉiam antaŭpagita.  
Ĉiam: tri aperoj de la sama  
anonco en sinsekvaj kajeroj  
por la prezo de du aperoj.

Kurzo: 1 irpk = 24 b.fr.

Se vi havas iujn kontaktojn  
kun Skolt(in)oj, la Skolta  
Esperanto-Ligo bezonas vian  
helpon en la tasko varbi  
novajn membrojn. Petu in-  
formmaterialon de la Ĝener-  
ala Sekretario:S-ro David H. Withey,  
21 Brookfield Avenue,  
Liverpool L22 3YE, Britio.

Tiu

ĉi

spaco  
estas

rezervita

por vi!

-----  
Reklami estas informi;  
ju pli vi informas,  
des pli vi vendos.  
Uzu la senkoston servon de  
via propra komunikilo:  
La Laŭokaza Novaĵletero.  
Kaj ĉiam legu la  
rubrikon, Reklamanoncoj.  
-----Serĉas informojn pri ebleco  
dungiĝi en hotelo, eble sed  
ne nepre en Francio, juna  
aspiranto por posta posteno  
de direktisto, nun je la  
fino de plurmonata plen-  
tempa kurso en la metio:S-ro Eric Benech,  
abs de Mme Sottas,  
14 rue Froissart,  
75003 Paris, Francio.La ebleco utiligi la i.l.-n  
en la posteno estas fervora  
espero de la kandidato.-----  
La Stelo.La valida kurzo en Britio  
por la Stelo estas:1.00 pundo egalas al 3.465  
Steloj. Respondekas pri ĝi  
S-ro Lorens' Mi,  
19 Cranbury Road,  
Eastleigh, Hants., SO5 5HB,  
Britio. Petu detalojn,  
aldonante irpk-on.  
-----*Teknike pri la Laŭokaza Novaĵletero.*Respondeca redaktoro de la Laŭokaza  
Novaĵletero estas S-ro Lawrence Mee, ĉe  
la Redakcia adreso:  
19 Cranbury Road,  
Eastleigh, Hants.,  
SO5 5HB, Britio.Eldonanto de la Laŭokaza Novaĵletero  
estas Internacia Komerca kaj Ekonomia  
Fakgrupo, ĉe la provizora ĉefsidejo:  
Hornisgrindestrasse 8,  
7580 Buhl 16,  
Okc. Germanio.La Redaktoro kaj Eldonanto aperigas  
subskribitajn artikolojn sen aŭtomata ak-  
cepto de respondeco por opinioj tie esp-  
rimitaj.La rajto de represo estas malferma al  
ĉiu ajn persono aŭ instanco, kiu tiun  
rajton volas preni, kondiĉe nur, ke la  
fonto estu klare indikita.La limdato por ricevo de materialo por  
la proksima kajero estas  
lundo, la 10a de oktobro.  
en Eastleigh, Britio.La originala teksto-paĝoj de la LN-o  
estas preparitaj sur folioj de la formato  
dinA4, (210 mm oble 297 mm), kun posta  
redukto al grandeco de A5 antaŭ presado.La maksimume disponebla spaco por art-  
ikoloj proponataj kiel 'prespretaj', do,  
estas 180 mm en larĝeco kaj 240 mm en  
longeco. Normala skribmaŝino tajpas 71  
literospacojn en la larĝeco de 180 mili-  
metroj; alia tipo de maŝino skribas 85  
literospacojn en la sama larĝeco. Tiuj du  
ciferoj estas por ni la maksimumoj norm-  
ale uzataj.En longeco de 240 milimetroj, normala  
skribmaŝino povas meti 56 liniojn, inkl-  
uzive de iuj liberaj linioj; aliaj apar-  
atoj, ekzemple komputoroj, povas meti en  
longeco de 240 mm, 61 linioj. Ni pretas  
akcepti aŭ unu aŭ la alia.Oni povas pensi pri 600 vortoj kiel la  
kapacito de unu paĝo, utiligante la  
malpli grandan litertipon.La Redakcio bonvenigus artikolojn pro-  
ponatajn por aperigo en la Laŭokaza Nov-  
aĵletero, kondiĉe ĝenerale, ke la temo  
akordiĝas kun la sinteno de la Fakgrupo,  
kaj aparte ke la teksto mem obeas la reg-  
ulojn de la Fundamento de Esperanto kaj  
konformas al la normoj de interpunkcio,  
kaj tiel plu, normalaj en la LN-oj.